
# Kajeroj el la Sudo

*BULTENO DE **H**ISPANA **A**SOCIO DE **L**ABORISTOJ **E**SPERANTISTAJ (HALE)*

**http://esperanto.dragonfire.net/k45.htm**




Antaŭ dek jaroj la muro de Berlino falis, kaj per ĝi falis multaj aferoj. Multaj personoj diras, ke la merkato venkis, ke ni vivas la histori-finon kaj ke ni estas *globa vilaĝo*.

La muro de Berlino falis ĉar la reĝimo totalisma ne povas venki la ideon pri libereco de la popoloj de Eŭropo. Ni la eŭropanoj havas komunan kulturon, la kulturon de la malnovaj greklandoj, la kulturon de la malnovaj romianoj.

La germana filozofiisto Nietzche diris, ke *en Eŭropo la eŭropanoj partoprenas la saman ideon pri libereco. Libereco estas ideo, sed en orienta parto de la mondo la libereco apartenas a la gvidantoj aŭ estroj de tiuj ĉi popoloj*.

Tio signifas ke ni havas la ideon de libereco, kaj tio ĉi estas la diferenco kun aliaj popoloj.

Kiam falis la muro de Berlino, la ideo de libereco de la malnova civilizacio greka sukcesis kaj la muro falis pere de la neperforto, kaj nek bataliloj, nek tankoj nek aviadilo sukcesis tiucele, nur la malperforto.

La leciono de la muro parolas pri la granda malinteligento de la personoj, de la reĝimoj, kiuj starigas murojn, kaj la popoloj faligas la murojn; kaj ni, la

Daŭrigas en paĝo 20-a

**Nº 45** **Januaro/marto 2000**

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**



*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*

*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*c/ Stª Teresa, 22-2º CD,*
*ES30005 MURCIA*

*Kasisto:* ***José María Bernabéu Franco***
*Gral. Primo de Rivera, 8*
*E-03360 Callosa de Segura,*
*ALICANTE (Hispanio).*

*Libroservo:* ***Nicolás Gil Carballo,***
*Apartado 305*
*ES24080 LEÓN*

*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*


Nia revuo interŝanĝiĝas al ***Monato, La Migranto, La Internaciisto, SLEA Informilo, LEA/G, La Verda Proleto, Juna Amiko, La Kancerkliniko, Sennaciulo, SAT-Amikaro, Naturista Vivo, Esperanto*** *kaj* ***Laŭte!***

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la* **nova konto** *nº* **1302 0412 86 0022655110** *en libreta de Caja Postal. Sen aldona kosto.* La abono kostas 1000 pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvintancon oni ricevos.

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**

**Kovrilo**: Jam dek jarojn sen la Muro de Honto. Bedaŭrinde malmankas muroj kaj hontoj...

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

## Enhavo


Dek jaroj senmuraj ..... 1
Redaktore: *mona problemo* ..... 3
Informoj de la Prezidanto ..... 4
Patro kaj morto ..... 5
Neperforto kaj Esperanto ..... 6
Recenzoj ..... 12
Almozoj kaj malriĉuloj ..... 13
Kvazaŭ lupinoj maskovestitaj de ŝafoj ..... 14
Labormondo: *Socia evoluo* ..... 16
Malfeliĉaj kristnaskoj ..... 21
Reage al kritika artikolo ..... 22
Enkonduko en muziko: *La korda familio* ..... 23
Elektronika krizo ..... 24

# Redaktore:

## Mona problemo

***Kajeroj el la Sudo*** estas tre sendependa magazino. Samtempe ĝi estas la bulteno organa de laborista asocio *HALE*. Inter la kotizantoj de nia magazino estas du apartaj tipoj: 1 tiuj, kiuj fajfas pri la asocio (kvankam ili estas laboristoj aŭ ekslaboristoj), sed ili volas legi la magazinon, kaj **2** tiuj, kiuj fajfas pli-malpli pri la magazino, sed gravas al ili la asocio. La duan tipon igas esperantistoj, kiuj laboras kaj vivas en Hispanio, aŭ fore, sed tamen ili estas hispanoj. La unua tipo konsistas el esperantistoj el diversaj naciecoj (eĉ sennacianoj), kiuj loĝas ie ajn en la mondo, sed ili ŝatas nian magazinon, kaj volas legi ĝin ĉiunumere. Mi gratulate redaktas ĝin per artikoloj sendataj al mi el la kvar anguloj el la mondo de diversaj kamaradoj, kaj mi ĝin sendas ĉiun monatotrion al 200 kamaradoj loĝante en pli ol 40 landoj. Tamen, estas nur 39, kiuj rajtas vere ricevi ĝin. Ses eŭroj ne estas malriĉiga kvanto da mono, kaj pro tio ni ĉiam rezistis plialtigi la kotizon. La lastan numeron, ni preskaŭ bankrotis, ĉar la plidikiĝo de la magazino kaŭzis, ke la kosto de la multobligado kaj sendado plialtiĝis, kaj la kotizintoj estis malplej grand-kvantaj. Mi daŭre klopodos sendi nian magazinon al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri ĝi, sed mi ne scias, dum kiom da tempo mi povos fari tion. Ni devis forlasi la sidejon de nia elektronika versio en http://www.distrito.com post dujaraĝa loĝado pro manko da mono. Ĝi ankoraŭ kuŝas ĉe loĝejo http://esperanto. dragonfire.net, sed ni ne scias dum kiom da tempo.



Mi aldonas la liston de pagintoj. Se vi, leganto, opinias, ke vi devas esti inter ili -pro tio, ke vi jam pagis-, bonvolu skribu al mi tuj:

1) Adolf Vezelý, Chequia.
2) Ana Mª Manero García , Madrid.
3) Antoine Ribas, Chequia.
4) Antonia Puerta Palacios, Zaragoza
5) Antonio Marco Botella, Zaragoza.
6) Antonio Sánchez Belda, Callosa.
7) Eduardo Larrouy López, Bilbao.
8) Enrique Navarro Rubio, Zaragoza.
9) Giordano Moya Escayola, Matadepera.
10) Jacques Wilfrid, Gran Bretaña.
11) Joan Manau Valor, Barbera del Vallés.
12) Joan Solé Pujol, Barcelona.
13) José Antonio Fleta, Zaragoza.
14) José Mª Bernabéu Franco, Callosa.
15) José Mª Galofre Domingo, Sabadell.
16) José Miguel Bernabéu Egea, Alicante.
17) José Pina Tuells, Murcia.
18) Joxemari Sarasua Abaro, Billbao.
19) Juan Antonio Cabezos, Murcia.
20) Kultura Asocio Esperantista, Sabadell
21) Lorenzo Noguero Sarasa, Zaragoza.
22) Manuel Suárez, Francia.
23) María del Mar Guirao, Murcia.
24) Martín Bustín Benito, Alicante.
25) Miguel Fernández Martín, Madrid.
26) Miroslav Závodský , Eslovaquia.
27) Nicolás Gil Carballo, Gipúzcoa.
28) Pedro Ruiz García. Molina de Segura.
29) Peter Holt Tramuntana, Puerto Soller.
30) Ramón Manau Torres, Sabadell
31) Siegfried Linke Fischerstrechrstr, Alemania.
32) Stella de Weerd, Bélgica.
33) Teresa Carbo Comas , Palafrugell
34) Tomás Ortiz García, San Javier.
35) Vicente Hernández Llusera, Sabadell.
36) Florika Popa, Romanja.
37) Alwyn Kind, Britio.
38) Mª Carme Colomer, Girona.
39) Carme Llapart, Figueres.

# Informoj de la prezidanto

Estimataj haleanoj kaj gelegantoj de ***Kajeroj el la Sudo***:



Ĉiu Asocio mortas, kiam ĝi ne havas internan vivon, kiam ĝi ne havas projektojn, aŭ ne havas ideojn. Sed Hale havas internan vivon, Hale havas proprajn projektojn kaj ni havas proprajn ideojn.

PROJEKTOJ POR LA JARO 2.000:

1ª AĈETO DE ĈAMBRO.

En la konstruaĵo de domo kaj oficejoj kie mi havas la advokatejon, la posedantoj de la konstruaĵo konstruos ĉambrojn sur la tegmento.

La esperantistaro de Mursjo volas aĉeti ĉambron, kiu estos la loko por la regiona arĥivo de la esperantistaro en la provinco de Mursjo. Kompreneble ĝi estos, ankaŭ,la arĥivo de Hale.

Mia advokatejo estas situita en la centro de Mursja urbo, kio estas la ĉerfurbo de la provinco Mursjo.

2ª LOKO POR REKONTIĜO.

En Mursjo ni havos tri lokojn por rekontiĝo:

La unan sabaton de ĉiu monato ni rekontos en mia advokatejo kaj ni atendos la burokratiajn aferojn.

La duan kaj kvaran sabatojn ni rekontiĝos en trinkejo. En la trinkejo la hispanoj povas aŭskulti nin en E-o, tiel ke ni per ekzemploj povas divastigi nian lingvon.

La trian sabaton ni rekontiĝos en la urbo Lorko, kie ni kongresumis la pasintan jaron.

En Mursjo ni havas bonŝancon ĉar ĉiun sabaton de almenaŭ naŭ monatojn de la jaro ni povas paroli en Esperanto.

3ª.- DONACOJ.

La ŝparkaso *Mediterraneo* donis du komputilojn al la esperantistaro de Mursjo.

Nia samideano, José Pina Tuells, lingvkontrolanto, uzos unu el ili.

La alia komputilo iros a la samideanaro de Lorko.

Kiel vi scias en Lorko en tiu ĉi jaro 1999 ni havis la unuan kongreson de Hale. Mi opinias, ke estas juste ke la haleanoj de Lorko havas propran komputilon, kompreneble senpage.

4ª PLIGRANDIGI LA LEGANTARON.

Kiel pligrandi la legantaron de ***Kajeroj el la Sudo***?

Mi decidis apliki la merkatoteĥnikojn por pligrandigi la legantaron.

Ni sendos mesaĝojn al ĉiuj esperantistoj, kiuj havas *e-mail* kaj ni invitos ilin viziti nian paĝon web, paĝo kiu enhavas ***Kajerojn el la Sudo*** kaj novaĵojn pri nia asocio[1].

Ni komencos per Norvegio, Svedio, Finnio, Danio kaj Britio kaj post un jaro ni pripensos ĉu pligrandi la legantarojn aŭ ne, kaj ĉu ni sukcesis aŭ ni fiaskis[1].

Nia Asocio estos forta se la esperantistaro legos nian bultenon kaj kunlaboros kun nia celoj: divastigi Esperanton.

La estraro de Hale atendos viajn sugestojn, viajn kunlaborojn por divastigi HALE-n kaj esperantajn lingvon kaj movadon.

Dankon elkore.

[1]Vidu la sekvojn al tio, je paĝo 24-a.

# Patro kaj morto

Priskribas Rafael Gómez la menson fanatikan, postmodernan kvazaŭ pupilon, tio estas, ju pli da lumo ĝi ricevas des pli ĝi fermiĝas. La aborto estas sendube unu el tiuj temoj pri kiu la plej fanatikaj uloj estas malpli pretaj akcepti lumon. *Filo* kaj *patrino* estas ŝlosilaj vortoj rilate temon en kiu, se oni preterlasas ilin tuj, oni sin trovos implikita en frivolan fadenfaskon el sengravaĵoj. Ties anstataŭo fare de *virino* kaj *embrio* portas nin al ekirejo de kie estos forigita ĉiu ajn ero de respondeco. La vorto *patrino* kunportas nedisigeble tiujn de *virpatro* kaj *filo*. En tiu ĉi temo intermiksiĝas reciprokaj preekzistaj necesoj, kaj antaŭ tiu ĉi triopa scenejo, tio estas, patrina, virpatra kaj fila; la volonta aborto estiĝas triopa afero. La problemoj de unuj trafos la ceteran, kaj inverse, do, la eblaj solvoj povos nek preterlasi nek postlasi iun el ili.



Oni bezonas trovi solvojn por ĉiuj tri, kaj tio ĉi estas agi nome de la racieco. Jen tri subjektoj kiujn oni ne povas koncepti izolitaj unu de la aliaj. Ne rigardadi tion gvidos onin al supraĵeco, hipokriteco kaj al sintena duonblindeco.

Ekzistas du terminoj ŝtelitaj al la priaborta debato: virpatro kaj morto. Jen du konceptoj nepre prikonsiderendaj, kaj necese ligitaj al la terminoj *patrino* kaj *vivo*. Ĉio estas pli facila sen tiuj ĉi figuroj. Ne prikonsiderante la virpatron la korpremo kaj la doloro apartenas nur al *iu ulino*. La decido pri aborto tiel ankaŭ estas solpresona, kaj la vorto *filo* pli malfacile lokhavas, aŭ ŝajnas kvazaŭ artefaritaĵo.

Sen *morto* ni ne parolos pri *vivo*. Kvankam la vivo ekzistas, kvankam ĝi estas tie, estas pli bone ne paroli pri ĝi, aŭ ni estos en la devo helpi nin per la morto. Estas pli *politike korekte* paroli pri interrompo, ĉerpo aŭ aborto; ĉio ajn ekscepte pri morto. Se tio, kio estas en la patrina sino estas vivanta, kio estas evidente, kiam ni pripensas aborton ni pripensas pri morto.

Je decidema veto favore de la neperforto kaj la vivo, **nek patrinojn en karcerojn, nek preterlason de la virpatroj, nek filojn al la rubaĵo aŭ al la fabriko pri kosmetikaĵoj.**


Je la porviva veto ambaŭ gepatroj devas esti helpataj, tiel ke ili povu protekti sian filon dum la gravedeco. La eblecoj aborti antaŭ suferoj korpremaj aŭ promizeraj, aŭ pro fizikaj fetaj malperfektecoj, ne povas esti protektataj ekde sinteno respondeca. La aborto ne povas esti montrata al niaj filoj kiel alternativo, kiel ago kiu meritas protekton. Ni devas klarigi la aferojn tiel, kiel ili estas, klarigi kie estas la vivo kaj kie estas la morto, ĉar nur kadre de la vivo ni povas hominde serĉi la necesajn alternativojn kaj solvojn.

***Julio García Irigoyen.***

# Neperforto kaj Esperanto

*Kadre de la unua Kongreso de HALE ni aŭskultis du prelegoj. Ni prezentas ĉi tie tiun prelegon de Prezidanto de HALE, Johano Antono Kabezos Martinez.*

Gesinjoroj, dankon tial, ke vi ve-



Kabezos prelegas pri Neperforto kaj Esperanto

nas al ĉi tiu prelegeto pri *neperforto, civila rezisto kaj Esperanto*.

Antaŭ ol mi komencas, mi volas danki la anojn kaj estraron de la Kazino de Lorko pro tio, ke ili permesis okaziĝon de la 10ª Kongreso de Esperanto de la Federacio de Valensjo kaj Mursjo.

Nun, kiam oni malbondiras pri la kono de la klasika mondo ĉe studoplanoj, estas utile memorigi, ke greka aŭtoro, Aristofano, skribis en sia verko ***Lisistrato***, ke virinoj rifuzis havi seksajn rilatojn kun siaj edzoj por ke ili ĉesu praktiki militon. Lisistrato, la heroino de tiu rakonto, sukcesis: viroj ne faris militon por fari aliajn aferojn. Tio, kion Aristofano starigis komedie, ankaŭ faris, sen legi la antikvan komediiston, irokaj virinoj en antaŭkolomba Nordameriko, kiam ili rifuzis koiti siajn edzojn militemajn, ĝis kiam ili konkeris la rajton decidi ĉu sia nacio devis militi aŭ ne. Per tio ni eniras plene en la klavon de neperforto: bezono kunlabori por konservi funkciadon de esencaj taskoj de socio.

Registaroj bezonas popolojn multe pli ol popoloj registarojn, kaj el tiu konsidero ni povas alproksimiĝi al la difino pri civila rifuzo, kiel proponite de Miĥaelo Randle en sia libro ***Civila Rifuzo***, konceptita kiel metodo de politika batalo kolektiva, bazita sur funda ideo, ke registaroj dependas esence de kunlaboro, aŭ almenaŭ, de obeo de plimulto de la loĝantaro kaj lojaleco de

militistoj, policanoj, de servoj pri civilaj sekurecoj, kaj de ĝiaj partianoj. Miĥaelo Randle mem signalas du trajtojn de rifuzo civila: la unua temas pri kolektiva agado, kaj la dua evitas ĉiun sisteman apelacion al perforto. Li inkluzivas, ankaŭ, la tiel nomatan *agon neperfortan* ene de civila rifuzo. Ĉi tiu inkluzivas agojn pri rezisto individua, kiel ekzemple konscian obĵeton.

Tial post difino de neperforto kiel kolektiva ago kiu evitas iun ajn apelacion al perforto kaj kiu komplementiĝas per ago neperforta kiel ago individua, ni povas demandi al ni pri kian efikon havas la elekto neperforta. Neperforto ne estas panaceo (*ĉionkuracilo*), ĝi ne solvas ĉiun problemon starigatan al socio, sed ĝi ne pligravigas ilin, male al la elekto perforta. Neperforto estas produkto de civilizo eŭropa, kvankam ĝia plej karisma homo estas la bharata Mahatma Gandhi. Sed ni ne forgesu, ke li studis en la prestiĝa angla universitato de Oksfordo, kaj tial li ricevis eŭropan intelektan edukadon.

Mi citos kelkajn ekzemplojn pri eŭropa intelekta alporto al neperforto:

Ĉe ***Antigono***, verko de malnova greka aŭtoro Sofoklo, ni vidas, ke la heroino defias la ordon de Reĝo Kreono pri neentombigo de ŝia frato Poliniko. La krimo de Poliniko estis gvidi fremdan armeon kontraŭ sia ŝtatcivito, Tebas. Antigono stariĝis kiel defendanto de la devo de obeo al propra konscienco. Kontraŭ leĝo de devo, Antigono kontraŭagas leĝo de konscienco. Oni ne devas malplivalorigi tiun alporton de Sofoklo, ĉar la teatro havis en la klasika mondo rolon de edukado intelekta kaj politika de civitano de ŝtato-civito greka, kiel ĵurnalisto kaj historiisto itala Indro Montanelli rimarkas ĝin en sia ***Historio de grekoj***.

La alporton de malobeemo sekvis la kristanoj, kiam ili starigis duoblan kriterion: unuflanke, oni devas obei civilan aŭtoritaton, sed aliflanke, kristano devas malobei leĝojn konsideratajn pekigajn. Sankta Tomaso de Akino, influita de tradukoj faritaj en tia *Hispanio de la tri kulturoj* pri intelektuloj de la mondo grekolatina, defendas doktrinon pri natura leĝo bazita sur racieco kaj komuna bono por kiu oni devas pritaksi ĉiun leĝon faritan de homo: kune kun ideo pri racia natura leĝo, Tomaso de Akino subtenas la ideon pri civila malobeemo, kaj en ekstremaj kazoj, eĉ perfortan agon kiam registoj alvenis al povo per perforto aŭ koruptado.

La dua granda intelekta movado de nia civilizacio, Renesanco, alportis mane de Mirandolo la koncepton pri homa digno al individua konscienco kaj renaskiĝo de la Klasika Mondo. Ankaŭ dum Renesanco, Kalvino, la kreinto de kalvinismo —kiun en Anglio oni nomis *puritanismo* kaj en Francio *hugonotismo*— insistis pri la devo obei civilan aŭtoritaton, sed li agnoskis, ke oni povas rezisti legitime kontraŭ malpia registo. Tio estas kristana tradicio.

En la 17-a jarcenta Anglujo okazis historia ago, same kiel antaŭe en tia Hispanio de Karlo la 1-a kaj tia Francio de Ludoviko la 16-a: ribelo de popolo kontraŭ reĝa klopodo starigi absolutisman ŝtaton, kiel oni jam faris en la cetera Eŭropo. Sed malsame de la hispana kaj franca kazoj, la popolo sukcesis en Anglio kaj senkapigis sian reĝon, Karlon la 1-an.

Defendanto de la Angla Revolucio, Ĝon Loke (John Locke) justigis senoficigon de la monarĥo, dirante, ke li estis nek protektanta liberecon, nek propraĵon, nek la vivon de siaj subuloj, kaj pro tio, ke li ne protektis tiujn individuajn rajtojn, homo havis devon malobei la reĝon. Alia anglo, Ŭiljam Godŭin (William Godwin) defendis, ke *por malstarigi maljustan registaron sufiĉas nei obeon al ĝi*: se oni ne obeas, la meĥanismo, sur kiu maljusta rego apogas sin, kolapsas: anstataŭigo de libereco kaj perforta subteno.

Usonano Henri Davido Soro (Henry David Thoreau) aŭtoris en la jaro kiam naskiĝis

Zamenhof, 1859, eseon pri malobeemo civila, kiu devenis klasikon ene de literaturo pri malobeemo. Ĝia titolo estas ***Pri civila malobeemo*** (originale *On Civil Disobedience*), kaj ĉe ni oni tradukis kiel ***Resistencia al gobierno civil*** (rezisto al civila rego). Soro defendas civilan malobeemon selektitan laŭ konscienco: *mi ja scias, ke se mil homoj, aŭ cent, aŭ dek, kies nomon mi povus mencii, eĉ se unu honesta homo de ĉi tiu ŝtato de Masaĉusets, ne plu havante sklavojn, decidu fakte apartigi sian kunpartoprenon kaj oni enfermigu lin pro tio en gubernan malliberejon, ĝi iĝus la abolicio de sklaveco en Nordameriko*. Soro rifuzis pagi kapan imposton (individua imposto), argumentinte, ke ĝi subtenas sklavecon kaj maljustan militon kontraŭ Meksiko.

*Antaŭ kelkaj jaroj*, diras Soro, *ŝtato postulis al mi nome de la eklezio pagi certan kvanton por subteni pastron, kies oficon miaj patro kutimis ĉeesti, kvankam ne mi.* ***Pagu***, *oni diris al mi,* ***aŭ vi estos enkarcerigata****. Sed bedaŭrinde alia persono decidis pagi anstataŭ mi. Mi ne vidis kial instruisto devas kontribui per sia imposto la subtenon de la pastro, kaj ne la pastro al tiu de la instruisto. Kaj eĉ mi ne estis ŝtata instruisto kaj mi subtenis min per popola subskribo. Mi ne vidis kial al lernejo mankis rajto ricevi imposton ŝtatan, dum eklezio ja havis ĝin. Ĉiel, antaŭ postulo de urbkonsilantoj, mi akceptis redakti deklaracion je tiuj terminoj:* **sciu ĉiuj per ĉi tio, ke mi, Henri Soro ne volas esti konsiderata ano de iu ajn socio laŭleĝe starigata en kiu mi ne enskribis mi mem**. *Mi donis ĝin al pedelo kaj li havas ĝin. La ŝtato, sciante tiel, ke mi ne volas esti konsiderata ano de la eklezio, neniam postulis tiun imposton al mi, kvankam ĝi postulis al mi tiun solan fojon. Se mi sciintus tiam kiel nomi ilin, mi forstrekus mian nomon de ĉiu socio al kiu mi neniam aliĝis, sed mi ne sciis kie trovi la kompletan liston.*



**Henry David Thoreau**

Soro estas la iniciatoro pri la objĵeto fiska, kaj li estis influita de la verko de La Boetjo ***Pri volonta servuteco.*** La verko de Soro influis Tolstojon, kiu defendis individuojn, kiuj agis senrigarde al sekvoj de siaj agoj. Aliflanke, ne perforto laŭ Tolstojo estas religia vidpunkto defendanta la kristanan doktrinon, kaj laste li komprenis pri la povo de publika opinio. Tiel, li defendis sukcese la plendon de pacisma sekto kristana, kaj deklarante favore al ili, oni permesis al ili elmigri amase al Kanado.


Kaj Soro kaj Tolstojo influis Mahatman Gandion, eĉ pli, tiuj du lastaj interrilatis perkoresponde. La grava alporto de Gandio estis *satyagraha*. En Bharato ne estis ekvivalenta vorto al *rezisto paca*. Pro tio, li elpensis la vorton *satyagraha* en 1907 kiel ekvivalenta vorto en ĉiuj lingvoj parolataj en Bharato. Aliflanke, Gandhio substrekis transformi pacan reziston en konverton de kontraŭulo baze de la propra volonta sufero kaj rifuzo pro principo pri ciu apelacio al perforto. El tio venas, ke la vorto *satyagraha* estas sinonimo de neperforto kaj sufero volonta celante konverti la kontraŭulon.

Kiam Gandio klarigis pri modoj de funkciado de *satyagraha*, li emfazis la impakton moralan kaj psikologian de volonta sufero sur la kontraŭulo kaj li insistis pri dependo de registaroj de kunlaborado fare de popolo kaj vundebleco de aŭtoritato kontraŭ nekunlaborado daŭranta. Gandia penso ankaŭ faris pluan alporton: diferenco inter devoj moralaj altruditaj al tiuj, kiuj akceptis plene doktrinon pri *ahimsa* (neperforto) kaj ankaŭ

al tiuj, kiuj ne akceptas ilin. Tiuj unuaj neniam devis apelacii al perforto, sed ili devus preti ankaŭ doni sian vivon se venas la okazon oponi sin al maljusteco. La lastaj ne nur havis rajton uzi perforton en ekstremaj cirkonstancoj, sed ili ankaŭ devis fari tion, kondiĉe ke ili ankaŭ pretas adopti neperfortajn metodojn.

Ni konsideru la 20-an jarcenton, eble la plej konfliktan jarcenton en la homa historio. Ni centriĝos en Eŭropo por vidi kiom efikas neperforto:

En 1905 en Rusujo estis granda kvanto da manifestacioj. Por subpremi ilin, la registaro uzis perforton dum la tiel nomita *ruĝa dimanĉo* ĉar la urbo Sankta Peterburgo tinktoriĝis ruĝe per la pafoj de la cara polico. Manifestantoj ne uzis perforton kaj rezulto estis, ke la aŭtokrata registaro de Rusujo bezonis permesi la ekzistadon de parlamento aŭ *Duma*. Se manifestantoj respondintus perforte al policaj pafoj, la estraro povus justigi morale sian neon al malfermo de parlamento.


Juna Tolstojo

En 1914 la ĉefaj laboristaj aroj de Eŭropo antaŭvidis danĝeron pri eŭropa milito grandskale, kaj por eviti ĝin ili lanĉis konsignon pri ne aliĝo al la naciaj armeoj. En julio de 1914 komencis la milito, kaj la aliĝintoj al grandaj organizaĵoj de laboristoj estis la unuaj aliĝi al la koncernaj armeoj kaj la sekvo estis buĉado, kiu daŭris 4 jarojn. Se ili obĵetintus, la milito daŭrintus malmulte da tempo ĉar neniu registaro eltenas militon kun societo dividita.


La Duan Mondmiliton karakterizis scienca uzo de perforto kaj aplikado de kriterio pri planado industria por morto. Tamen, naziistoj malsukcesis nur kiam estis neperfortaj respondoj de la popolo. Sir Basil Liddlehart, strategiisto kaj oficiro de la brita armeo enketis post la 2-a Milito Monda pri strategio de la germana armeo. La germanaj generaloj deklaris, ke ili ne kapablis alfronti civilan reziston bazitan sur neperforto. Ilia fako estis perforto kaj ilin oni kapabligis alfronti kontraŭulojn, kiuj uzas perfortajn metodojn. Sed aliaj manieroj rezisti perdigis ilin, ĉefe pro subtila kaj sekreta trajtoj de tiuj metodoj uzataj. Ili komfortiĝis kiam rezisto uzis perforton, kaj kiam la perfortaj kaj neperfortaj metodoj kuniĝis, ĉar tiam faciliĝis la tasko apliki durajn rimedojn subpremi tiujn du rezistojn samtempe. Ni ne forgesu du allogajn faktojn kiuj okazis dum la 2-a Mondmilito:

1 En Norvegujo 43 organizaĵoj kiuj totalis 750 000 anojn starigis organizan komitaton por kontraŭi tiun provon de Kinsling (Quinsling) meti iun ajn el ili sub nazian regadon. En 1942 instruistoj sukcese defiis provon enkonduki doktrinon naziisman en lernejojn, kio kaŭzis, ke Kinsling forlasis sian klopodon starigi en Norvegujo ŝtaton korporativan.

2 En Danio la decido de la Reĝo porti la stelon de Davido, deviga insigno por ĉiuj judoj, evitis persekuton fare de naziistoj, kaj tiu ago ebligis, ke oni kontrabande eksterlandigis en Svedion 95 pocenton da norvega judaro.

Sed tio, kio restas ĉe kolektiva menso de eŭropaj popoloj, estas la *Praga Printempo*. Post elekto de Aleksandro Dubĉek' kiel sekretario de la komunisma partio en januaro

de 1968, tiu lando brakpremis programon pri reformoj ekonomiaj kaj politikaj, kiuj celis konstrui socialismon kun homisma vizaĝo. Tiuj reformoj inkluziviĝis ĉe Programo pri Agado, kiun oni aprobis en aprilo de 1968. La du plej danĝeraj flankoj de tiu programo, laŭ sovetoj kaj kelkaj gvidantoj de la Pakto de Varsovio, estis reorientiĝo de komerco al Okcidento (al Germanio aparte), kiel parto de pakedo de reformoj ekonomiaj kaj virtuala nuligo de cenzuro, kiel parto de politikaj reformoj.




Dum la someraj monatoj estis konversacioj inter Dubĉek kaj sovetaj gvidantoj. Subite, la nokton de la 20-a de aŭgusto, 400 000 soldatoj de Sovetunio, Polujo, Hungarujo kaj Orienta Germanujo invadis la landon. Sovetoj esperis, ke oni rapide nomigu marionetan registaron, sed tio fiaskis, kaj la *Presidium*, tio estas, la ĉeĥoslovaka registaro, elsendis komunikon, kiu kondamnis la invadon. Ili petis la popolon, ke oni trankviliĝu kaj ke oni ne rezistu la eksterlandajn fortojn en sia progreso en la landon. Popolaj protestoj komencis: aldone al sidiĝo antaŭ la tankoj, studentoj kaj junuloj, kiuj lernis la rusan en lernejo kaj universitato, ekparolis al surprizataj rusaj soldatoj, troŝarĝante ilin da argumentoj kaj defiante ilin trovi iun ajn pruvon pri kontraŭrevolucio. Post kelkaj tagoj sovetaj militaŭtoritatoj devis anstataŭi siajn soldatojn, ĉar ili estis morale venkitaj. La *Praga Printempo* estis venkata kiam ĉeĥaj gvidantoj vojaĝis al Moskvo por trovi eliron al invado. Sovetoj diris, ke se ili rifuzus akcepti rusajn postulojn, ili ne nur kompromitus siajn proprajn vivojn kaj liberecon, sed ili riskus, ke ega bano sanga estu en Ĉeĥoslovakio. Poste oni montris al ili torturilojn kaj la delegacio mem komprenis, ke ili estos torturataj kaj mortpafataj. Neperforto ne evitis, ke Ĉeĥoslovakio estu okupata dum kelkaj jaroj de la armeo de la Pakto de Varsovio, sed la kosto por landoj de la *reala socialismo* estis granda: unuflanke, ĝi devigis komunismajn partiojn de okcidentaj landoj kondamni la invadon, kaj alifanke ĝi nuligis ĉian moralan aŭtoritaton por provi novajn invadojn. Tiel, ni povas kompreni ke Gorbaĉov, iniciatoro de *glastnost* kaj *pereŝtrojka*, al peto, ke li evitu la disiĝon de komunismo en Polujo, respondis jene: *kion vi volas, ke ni faru, sendi denove tankojn, kiel en 1968 en Pragon*?

Ni ne forgesu, ke reĝimoj komunismaj kiel tiu pola aŭ orientgermana kun sia muro hontiga falis pace pro premoj el manifestacioj petante politikajn reformojn, escepte de en Romanio.

Laste, mi ŝatus mencii tri faktojn:

1 En Polujo kiam la pionira movado *Solidareco* komencis agi, poloj konstatis, ke kiam la laboristoj eliris en manifestacio paca, polico atakis ilin. Sekve, laboristoj de Gdansk ne eliris la ŝipejon, sed ili sidis sur la korto. La polico, surprizata, ne atakis ilin.


2 En Litovujo, dum la procezo rehavi sian sendependecon, gvidantoj studis taktikojn pri rezisto neperforta okaze de soveta invado.

3 En 1991 Gorbaĉov' suferis puĉon: en moskva Ruĝa Placo centoj da manifestaciantoj metis sin antaŭ la tankoj, haltigante la puĉan agon.

Tamen, ankoraŭ ni ne pritraktis la problemon pri subpremado, kiu estas la plej grava problemo pri neperforto. Ni ŝatus, ke ĝi eviteblas, sed tio dependas de registaroj,

kvankam la dispono mem elteni tiujn penojn kaj suferojn kaj tamen daŭrigi la aferon povas enhavi povegan impakton. Krome, subpremado povas turni sin kontraŭ tiu, kiu ekzercas ĝin.

Subpremado kunportas kostojn politikajn al tiu flanko, kiu faras ĝin. Tial registaroj pripensas ĝiajn sekvojn, sed kelkfoje ili decidas favore al ĝi, kiel en 1989, kiam ĥinaj aŭtoritatoj decidis ataki la Placon de Tianamenn. Je aliaj kazoj, registaroj havas nek la moralan nek la fizikan fortojn por ekzerci ĝin. Tiu estis la kazo de Erik Honeker, gvidanto de Orientgermanio, al kiu mankis apogo de Miĥajl' Gorbaĉov' kaj de sufiĉe granda nombro de sia propra partio por adopti subpremadan agon kontraŭ manifestacioj amasaj en Dresdeno kaj Berlino.


Gandio, apostolo de neperforto

Povas esti periodoj de ekstrema subpremo kaj pro tio ĉiu malkaŝa konflikto iĝas katastrofo, sed je tiuj okazoj kelkaj simbolaj agoj, kiel porti insignojn, kanti naciaĵojn aŭ ekzerci naciajn tradiciojn, povas kontribui konservi viva *kulturon rezistan*.

Kontraŭ subpremado, plej korodige estas uzo de humoro kiel armilo.

La sukcesoj de la povo de la popolo en la jarcento 20-a eŭropa pruvas, ke eĉ reĝimoj kiuj ŝajne ne eblis moviĝi, ekscepte de per milito, povas esti vundataj de povo de neperforto.

Kaj por fini mian prelegon, mi devas referenci al Esperanto, kaj vi certe demandos al vi: *kia estas la rilato inter neperforto kaj Esperanto?* Ĉia, ĉar la bazo de Esperanto kuŝas sur tavolo de neperforto, kiu konsistas el nia neo praktiki la lingvon imperian, kaj tial ni rifuzas kunlabori, kaj tio estas rilatpunkto al neperforto. Alia kialo estas, ke ni volas esperantigi la anglojn mem!

Dum la jarcentoj 16-a kaj 17-a la ĉefa lingvo monda estis la hispana, dum la franca ĉefrolis la jarcentojn 18-an kaj 19-an. Se veras tiu historia teorio pri *Apogeo de Imperioj*, laŭ kiu la monda povo translokiĝas el Oriento al Okcidento, la povo nune havata de Usono transiros al Japanio la venontan jarcenton. Pro tio, tiuj homoj, kiuj penas nun lerni la anglan por helpi sin trovi laborpostenon, post kelkaj jaroj ili devos lerni la japanan, kaj se scienco kaj genetiko ebligus nin vivi ducent jarojn, ni povus vidi, ke tiuj personoj je la fino de la 21-a jarcento devus lerni la ĥinan lingvon, ĉar Ĥinio kuŝas okcidenten el Japanio.

Fronte al tiu situacio ni proponas Esperanton kiel idiomon logikan kaj simplan.

Se Esperanto sukcesis postvivi dum pli ol cent jaroj, tio estas certe pro tio, ke ĝi havas la neperfortan trajton. Hitler persekutis Esperanton ĉar ĝin kreis judo, kaj sia konstraŭulo, Stalin, ankaŭ persekutis ĝin ĉar li konsideris, ke estas danĝere por la ŝtato, ke homoj parolu lingvon, kiun li ne povis kontroli. Kelkajn jarojn poste oni malfermis la esperanto-klubojn de Sovetunio, kaj same okazintus en Hitlerio, se ĝi estus vivinta plilonge.

Ĉe okcidentaj demokratioj ankaŭ Esperanto postvivis la falon de la franca el sia piedestalo kiel ĉeflingvo, malgraŭ la subteno de la franca registaro. Kaj tio eblis ĉar ni esperantistoj, per kolektiva neperforta ago, rifuzas kunlabori praktiki la regantan lingvon.

Ni ne kritikas aŭ batalas kontraŭ la angla lingvo nun, kaj ankaŭ ni ne kritikos aŭ batalos kontraŭ la japana lingvo post kelkaj jaroj, kiam ĝi ĉefrolos: ni simple rifuzas kaj rifuzos kunlabori.

Koran dankon.

# Recenzoj

## *Obĵetoj kontraŭ milito kaj militismo*

Ĉiu mezklerigita persono ja scias pri Leo Tolstojo, tiu mirinda verkisto rusa, kies verko ***Milito kaj paco*** ni ĉiuj jam legis, kaj ankaŭ eble vidis per tiu mastra filmigo de King Vidor de la jaro 1956-a kaj aktorigita de Henri Fonda kaj Odri Hepburn. Kamaradoj, kiuj lernis pri la historio de la *movado* esperantista, ankaŭ aŭdis pri Leo Tolstojo, pri lia famega duhora lernado de Esperanto, kaj pri lia morda plumo. ***Obĵetoj kontraŭ milito kaj militismo*** prezentas lian idearon pri milito kaj paco, kiun generis lia profunda religieco, kiu igis lin denunci falsan religion katolikan kiu benas mortigontan caran armeon. Li radiografias per tiu ĉi libro la respondecon de ĉiu socitavolo, kaj konkludas, ke




> *Por ke milito malaperu, oni ne bezonas internacian leĝon, arbitrajn tribunalojn, konferencojn aŭ kongresojn: nur sufiĉas, ke oni liberiĝu el mensogo, el sorĉismo, kiu malklarigas vidon pri aferoj. Sufiĉas nur, ke tiuj homoj al kiuj milito tute ne utilas kaj kiu konsideras sian partoprenon krima, ne militos, kaj ĉio estos farata.* (paĝo 98-a).

Je paĝo 104-a oni aŭskultas pli sennaciisman muzikon:

> *Vekiĝu, fratoj miaj! Ne auskultu tiujn mizerulojn, kiuj venomigas vin ekde via infaneco per spirito diabla de patriotismo, kies nura celo kuŝas pri elrabo de viaj posedaĵoj, de via digneco kaj de via libereco. Ne aŭskultu tiujn malnovajn subaĉetulojn en religiaj vestoj kiuj predikas militon nome de Dio, de iu dio kruela kaj venĝema kiu estas ilia propraĵo, ĉar ili inventis lin.*

Post kiam oni legis tiujn paĝojn de Leo Tolstojo, oni komprenas, ke li ja havis sufiĉe da enmovo por lerni Esperanton plej rapide kiel eble.

La libro estas publikigita de *Lípari Ediciones* kaj enhispanigita elruse de Carmen de Burgos. Estas bedaŭro, ke neniu ankoraŭ esperantigis ĝin. La libro vere indas legi ĉe ni.

# Karl May

En Germanujo nun aperis libro de la plej ŝatata germana verkisto Karl May ankaŭ en Esperanto. La entuteurope famaj libroj de Karl May nun jam aperis en multaj lingvoj, sed ĝis nun ankoraŭ ne en Esperanto. Nun oni faris tian tradukadon kaj la titolo de la libro nomiĝas ***Liberigo***. La eldonejo nomiĝas *Karl-May-Verlag*.


Kvankam la romanoj de la mondfama verkisto Karl May ofte agis (ludis) en la okcidenta parto de Usono (tiam temis pri indianoj kaj blankuloj) siaj romanoj ne estas konataj en Usono. Kvankam en la libroj de Karl May okazas multaj bataloj kontraŭ

indianoj au banditoj, la verkisto ĉiam instruas la pacon kaj amikecon inter la diversaj popoloj. Mi ne scias ĉu Karl May en sia vivo sciis pri Esperanto, sed liaj intencoj estis la samaj. Liaj aventuroj, kiujn li rakontis en siaj romanoj (kaj longtempe li ja asertis, ke ili estas veraj!), nur estis eblaj, ĉar li asertis ke li multaj lingvoj scipovas. Sed la vera vereco estas bedaŭrinde alia. Preskaŭ neniu regas tiom da lingvoj kaj dialektoj. Pro tio mi asertas, ke la *revoj* pri amikecoj en la tuta mondo, pri kiuj Karl May raportis, nur estis elpensitaj, sed per Esperanto mi vere povas havi geamikojn en la tuta mondo! En mia vivo venis unue Karl May, kiu vekis en mi la revon al amikecoj en multaj landoj, kaj poste venis Esperanto; per ĝi mi povas praktiki vere mian revon!

Se vi volas scii pli pri ĉi tiun libron, vi povas viziti jenan paĝon en interreto: http://www.fen.baynet.de/~ea1448/KMespera.htm

Ankau ekzistas internacia Karl-May-societo. Ĝi ankaŭ ofertas informojn pri Karl May en Esperanto (sed ankaŭ en la angla). La Esperanto-parton vi trovas per jena adreso: http://karlmay.uni-bielefeld.de/kmg/sprachen/speranto/index.htm

*Bernhard Maurer*
*http://www.fen.baynet.de/~ea1448*




# Almozoj kaj malriĉuloj

Tre plaĉis al mi la artikolo de Juan Antonio Cabezos *Pri malriĉuloj kaj miljonuloj* de ***Kajeroj el la Sudo*** de aprilo - majo 1999. Certe, doni almozon ne solvas la sociajn problemojn, estas ĝi kiel meti flikaĵojn sur eleganta vesto. Anstataŭ organizi almozentreprenon, pli bone estus atingi justan distribuadon de la riĉaĵo. La vera socia problemo estas problemo de justeco.

Ĉiu homo alvenas al tiu ĉi mondo je la sama maniero kaj havas samajn bezonojn. Estas ĝenerale akceptite, ke ĉiu homo havas la saman rajton por vivi, sed paradokse en la praktiko la homaj leĝoj ne kongruas kun tio.

Por vivi la homoj bezonas manĝi, havi vestaĵojn por sin protekti de la malvarmo, loĝejoj, ktp. La homo ne estas kreanto, kaj ĉion, kion li bezonas devas elĉerpi de la naturo pere de peno kaj laboro. El tio oni povas dedukti, ke por garantii la saman rajton al la vivo de ĉiuj, estu devigata garantii la egalajn rajtojn de ĉiuj al la uzo de la naturo.

La **justeco** estas la egala rajto de ĉiu homo al la uzo de la naturo. Komencas la maljusteco, kiam estas homoj, kiuj devas pagi al aliaj homoj nur por uzi la naturon.

Ekzistas en niaj leĝoj du malsamaj formoj de proprieco: la justa proprieco de tio, kio estas farita de homoj, kaj la maljusta proprieco de tio, kio ne estas farita de homoj, kiel naturo.

Sekvas en paĝo 20-a

# Kvazaŭ lupinoj maskovestitaj de ŝafoj

Kiel vi jam eble divenis, ni rilatos al la feministoj kaj al sia sekvantaro de viroj *anoj de la politike korekto*. La patroj de la U.S. (hispana mallongigo de Unuiĝo de Eksedziĝintoj) plejparte ŝuldas ilin la trakton, kiun ni ricevas je niaj eksedziĝaj proceduroj, same kiel tiun, kiun ni estas ricevontaj pro la temo de la fitraktoj, tio estas, esti disigataj de niaj gefiloj, forpelataj de niaj domoj, esti devigataj subteni *parasitinojn* dumvive, kaj, je miloj da kazoj, fariĝi viktimoj de falsaj denuncoj, kiuj eĉ pliigas la apartigon disde niaj gefiloj, aŭ, estigas nian enprizonigon (kio, kromdirite, tute ne gravas al la feministoj). De antaŭ du jardekoj, ili enfiltriĝis en ĉiujn tavolojn, forpuŝante al siaj samgrade kontraŭegalismaj kontraŭstarantoj, tio estas, la masklistojn (jam estas sciite ke la ekstremistoj estas prikondute egalaj unuj la aliajn). Ili jam kontrolas, krom aliajn aĵojn, plejmulton el la amaskomunikiloj. Ties povo estas, do, grandega. Ĉiusanĉe ili establas dialektikojn seksisman kaj viktimisman, laŭ kiuj la virinoj el la tuta mondo estas sisteme fitraktataj, kaj diskriminaciataj favore al la viroj, kaj tial la virinajn fiagojn oni nur devas konsideri justaj. Ĉu oni parolas pri viro murdita de sia edzino?…, nu, oni pensu, ke li fitraktadis ŝin unue, tial oni preskaŭ povas kvalifiki tian agon kiel *sin-defendon*. Se male okazus, li, nature kaj sendube estus krimulo malpardoninda. Ĉu ili rigardas anoncon? Certe ili sukcesos trovi en ĝi ian kaŝitan diskriminacian sintenon rilate la virinojn. Ĉu oni estas parolanta pri la kultivado de artiŝokoj? Ili certe aranĝos ĉion por fine paroli pri la teruraj laborkondiĉoj de tiuj kamparaj laboristinoj, ĉar tiuj devas labori dum 12 horoj ĉiutage, kaj krome, en dorsofleksaj penigaj pozicioj (ŝajne, por



la viroj kiuj agas same tiaj taskoj estas plezurigaj), kaj tiel plu. Ili (feministoj) agas kiel iu ajn malutila sekto. Ili dumvive kompromitis, kvazaŭnupte, kun siaj idealoj. Se oni enmetas feministon en entreprenon kaj ŝi atingas regopostenon, vi havu nenian dubon pri kion ŝi faros de tiam, t.e.: kontrakti ekskluzive virinojn kaj malestimi la plej kvalitajn virojn, nur pro la fakto, ke ili estas viroj. Tiaj virinoj protektas kaj apogas unu la aliajn. Jen alia ekzemplo: la Hispana Ministerio pri Sociaj Aferoj estas desupre malsupren, kaj inverse, estrata de feministoj. Do, ni eĉ ne pensu peti subvencion el tiu publika instanco. Ili tre bone scias kiu estos la uzo de la milionmiloj buĝetaj de kiuj ili disponas. Um-duonon estos pro tiuj feministaj asocioj kiuj kuraĝigas la malegalecon kaj la militon inter genroj. Kaj, pri kio vi kredas ke feminista verkisto verkos..? Nepre kaj obsede pri virinaj temoj, aŭ, ĉu vi ankoraŭ dubas pri tio? Alia afero estas tiu de la armea servo. Kial la virinoj

ne faras la anstataŭan socian servon? Ĉu ili ĉiuj estas handikapitaj? Tamen, nun, kiam la armean servon oni faros volonta kaj profesian, tio estas, pagata, ne maltrankviliĝu ĉar la feministoj jam klare esprimis, ker la virinoj devos armeservi same kiel la viroj. Kia malrespekto! Certe ili aranĝas siajn kampanjojn tre bone. Ili multe kaj ofte parolas pri malegaleco, kaj sekve, sen eĉ minimuma honto, agas jene: kiam estas io kunhavonta kun iu viro, ili dividas ĝin po du partoj; unu el ili por si mem, kaj la ceteran…, por si mem, pro tio de la pozitiva diskriminacio. Tia ĉi estas unu el la plej perfidaj taktikoj ekzistantaj nuntempe. En demokratia ŝtato fundamentita sur la egalŝanceco…, **tia diskriminacio establas la principojn de malegaleco kaj favoritismo**. Ĝi koruptas, do, la demokratian sistemon, kaj transformiĝas en devenigilon de maljustaĵoj, nepotismoj, kaj en kvazaŭenŝoviĝilon por nekompetentuloj. Tiel oni ne plu premios al la plej kapablaj homoj, ĉar tiuj ĉi estos malestimataj favore de personoj posedantaj malsuperaj meritoj, nur pro ties virineco. La antaŭon ili faras, krome, kun malrespekto nekomuna. Ili (feministoj) disdonas laŭdojn kaj postenojn kaj piedpremas homojn antaŭ ĉiuj kaj senrespekte, tiel ke individuoj kiaj la Ministro pri Laboro, s-ro Arenas, aŭ s-ro Belloch, aŭ ĵurnalistoj tiaj, kaj s-ro Fernando Delgado respondu per malspritegaj ridetoj al ties manovraĉoj, indaj de la plej antikva hispana pikantagaro. Neniu kuraĝu kontraŭdiri ilin, ĉar tiam ili ofende respondus al ĝi per *masklisto!*, aŭ alia insulto, kaj, nature, ili bojkotus la kontraŭdirinton je ĉiu ajn amaskomunikilo aŭ debato. Ankaŭ, se vi kontraŭdirus al ili per gravaj argumentoj, ili klopodus eviti al vi. Ili ne estas interesataj, eĉ minimume, pri tiu demokratia koncepto kiu estas la plureco de opinioj…, kredante ke siaj opinioj sufiĉas. Aldone ĉion ni klare pensu pri la jeno: por la feministoj kaj pro la plejmulto el la virinoj (ne estas, do, strange ke la nombro de feministoj pliiĝu iom post iom inter ili) la gefiloj, kaj ĉio ajn rilatanta al tiuj ĉi, stas afero ekskluzive patrina. Ili (feministoj) sukcese aranĝis senkoncernigi nin (virojn) pri ĉio ajn rilatanta al la naskojn kaj al niaj gefiloj, danke al la konsento de *siaj viroj* (tiuj antaŭe menciitaj kaj kelkmiloj pli). Jen la dramo kiu kaŝiĝas post la eksedziĝoj kaj granda parto el la fitraktoj. Nu, ni rememoru la historion: en terminoj ĝeneralaj estis kurboŝanĝa punkto en la jaro 1981-a. Antaŭ ol ĝi, la fitrakjtoj kutime okazis ene de la hejmoj, sed de tiu jaro, koincidante kun la aprobo de la Divorca Leĝo, kiu sankcias la neniigon de la virpatra rolo rilate siajn gefilojn, la spirallinio de fitraktoj okaze de eksedziĝoj kaj divorcoj kreskis spektakle pro la traŭmoj okazigitaj al la virpatroj. Konstituas, do, la feminismo unu el la plej grandaj mensogoj el tiu ĉi jarcento. Ĝi estas ja amaso de hipokritaĵoj kiu kaŝas en si movadon kiu, kvankam je sia komenco estis vere egalrajtisma, nuntempe ĝi estas subtila **formo de sektisma totalismo vere tre danĝera**. Tamen, ni (en U.S.) konstatis kun profunda bedaŭro ke tiujn ĉi tiel evidentajn situaciojn la simpla popolo kaptas, kaj pli ol sufiĉe konas…, sed ĝi ne movas eĉ unu fingron por eviti ilin. Krome, la eksedziĝintaj patroj, kiel kutime, reagas pasive kaj kun la plej malsaĝa rezignacio ege ekzistanta, ĉar ni mem estas fosantaj niajn tombojn permesante la supre menciitajn personojn forrabi senpune niajn rajtojn. Ja ni meritas kion ni havas, ĉar ne estas pli granda stultulo ol tiu, kiun feliĉigas la primokoj kaj la malestimo de la ceteruloj. **Sed ni ridu, ĉar la plej malbono estas ankoraŭ alvenonta.**



*Ramón Pastor Quirant*
*(Prezidanto de la U.S.)*



# Socia evoluo

de Giordano Moya Escayola

Estas konstateble ĉio en la naturo evoluas. Nia fizika aktuala mondo ne estas la sama kiel pratempe. La geografia evoluo ŝanĝiĝas laŭ geologiaj epokoj. La vivuloj ne evoluas tiel lante, sed ankaŭ laŭ geologiaj epokoj. La mamuloj ne ekzistis pratempe. Ili devenas de aliaj vivestaĵoj, kuj ne estis mamuloj. La vivantoj evoluas, sed ne egale aŭ samtempe. Hodiaŭ ekzistas vivantoj, kiuj malmulte evoluis tra la tempo.

Ŝajnas, ke la naturo estas impulsata de forto, kiu estas nekonscia kaj havas la tendencon, ke ĉiu ebla formo de vivo okupu la lokon en kiu ĝi povas vivadi. En la skalo de la aktuala vivo ĉiuj vivlokoj jam estas okupitaj, sed koste, ke unuaj vivantoj manĝas aliajn en certa ekvilibro inter la multnombraj idoj kaj tiuj malmultaj, kiuj atingis la plenkreskon por kapabli sin reprodukti.

Oni povas diri, ke nuntempe ĉiu speco jam atingis sufiĉan perfektiĝon por konservi sian ekzistadon, se ne estus pro la homagado. Ĉiu speco konservas sian direkton de evoluo. La hundo perfektiĝis je sia odorsento kaj tiu ĉefa direkto de evoluo ne povas transiri al alia direkto, al alia direkto jam ekzistas pli perfektaj vivantoj. La vivspeco kiu eraris la direkton de voluo simple malaperis.

La homo estas la vivulo en kiu la direkto de la evoluo estas la inteligento. Neniu alia vivanto povas esti komparablea pri inteligento al la homo, sed la inteligento de la homo ne estas tio, kio tiel plej diferencigas lin de la aliaj vivuloj. La homo fariĝis hegemonia en la mondo pro du aliaj kvalitoj, la kapablo scii kaj la sociemo, kiu permesas heredigi la sciojn kaj ilin pliigi, kio konsistigas la kulturon.

Ni posedas denaskajn instinktojn kiel la aliaj vivuloj, sed ĉion en rilato al la civilizacio oni devas lerni. Sen tiu lernado la homo restus sovaĝulo, natura sovaĝulo ne multe supera al la simioj.

La homo ne nur devas lerni la sciojn, sed ankaŭ lerni la memregadon de siaj naturaj instinktoj, kiuj ofte kontraŭstaras al la kulturaj atingoj. Niaj naturaj sociaj instinktoj ne estas sufiĉaj por pli ampleksa socio ol la horda. Kiam la socio estas pli multnombra ol la horda, ĉu en tribo, ĉu en ŝtato, estas jam necesa certa socia kohereco apartenanta al la kulturo. Estas normoj de konduto, kontraŭantaj al niaj plej profundaj instinktoj.

La tuta tragikeco de la historio kuŝas sur tiu dilemo. Pro tio ekde la Neolitiko ĝis nun, en la mallonga tempo, laŭ geologio, de dek mil jaroj, en kiuj la homo konkeris la hegemonion en la mondo, ankaŭ estis dek mil jaroj en kiuj la perforto-milito fariĝis la plej decida faktoro en la historio.

Dum tiu fera historia epoko, la kulturo iris kunigita kun la milito. Tiuj, kiuj sciis organizi pli vastan socion venkis kaj fariĝis mastroj, kiuj malvenkis devis submetiĝi al la venkintoj. El tio devenis la sklaveco kaj la sociaj klasoj. Tial, ke la povo tendencas al plia povio, kaj al plia vivado eĉ koste de aliaj, ofte ĝi alvenas al koruptiĝo kaj dekadenco. Nek la regantoj nek la servutuloj estas ĉiam la samaj. Ŝtatoj grandiĝas kaj poste malgrandiĝas. Aliaj povoj aperas, kun la sama karaktero, kaj la sorto de la milito estis la historia faktoro formanta la ŝtatojn. La malgrandaj ŝtatoj ofte estas absorvitaj de tiuj plej grandaj. Tiuj absorvitaj malgrandaj ŝtatoj, se ili multe daŭris, formis la popolojn. Tiuj kutime kaj rutine volonte kunvivis kun siaj mastroj. La nuntempa naciisma etnismo ne estas alio ol la sopirado al la mezepokaj ŝtatoj, forgesante ke la tiamaj popoloj, el okdek procento de kamparanoj, nek havis iun ajn povon nek liberecon. Ili subtenis la militistan regantan klason, la feŭdan, sen ia partopreno en la regado.

La demokratio en la tuta antikveco kaj en la mezepoko ĉiam estis sporada kaj nefirma. Ĝi floris en la helena epoko dum du jarcentoj kaj ne multe pli en la Romiana Respubliko. Nur en nia moderna epoko en la fondiĝo de la sendependa Usono kaj en la tuj posta Franca Revolucio, la demokratio instaliĝis en multaj landoj, ĉar finfine, malgraŭ siaj difektoj sukcesis pro supereco al la aŭtokrataj formoj de regado.

Kaj ni alvenu al nia nuntempo. Ni troviĝas en speciala situacio, pro la scienca kaj teknika prosperoj, —la mondo tiel praktike malgrandiĝis- ke ĝi jam povas fariĝi unu sola lando, sed ankoraŭ restas disvididita po multaj ŝtatoj kaj en diversaj gradoj de kultura disvolviĝo. Ne ĉie regas la libera sprimo de la penso, ne ĉie regas la respekto al la homa diverseco, kiu apartigas la homan socion de la nura gregemo, propra de la aliaj vivspecoj.

La socia organizo pro inercio ne tuj sekvas la rapidan disvolviĝon de nia teknika civilizacio, Ĉio indikas, ke nia tempo troviĝas en krizo de civilizacio. La teknika homaro jam estas tute interdependa, ĉu en la prospero, ĉu en ebla danĝera disfalo. Ni vere jam estas samsortaj, sed ankoraŭ la plejmulto el la homoj ne konsciiĝis pri tiu ĉi fakto. Ankoraŭ oni intencas daŭrigi tiun stadion de la civilizacio en kiu la milito estis la precipa historia faktoro. Ankoraŭ la diversaj potencoj agadas por konkeri la mondan hegemonion.

Kontraŭ la hegemonio de la grandaj potencoj kaj la premo de la grandaŭ ŝtatoj, oni komune reakcias revante pri la pasinteco, en la multiĝo de ŝtatoj laŭ pretenda socia identeco de limigita teritorio. La normo pri tutmonda socia organizo sub federala regado ankoraŭ ne esta majoritate perceptita. La nuna civilizacia krizo, kiu troviĝas en sia komenco, minacas multe daŭri kun tragikaj konsekvencoj.

Momente ni spertas la tutmondiĝon de la kapitaloj, kaj multaj transnaciaj entreprenoj disvastiĝas ekster kiu ajn kontrolo de impostoj. La diferenco inter la vivnivelo de la evoluintaj nacioj kaj tiuj subevoluintaj, anstataŭ mildiĝi kreskas, kaj pli frue aŭ malfrue la sociala problemo eksplodos unuigita al perforto sen kultura bazo, kio disigas la socion kaj reakcie alportas diktaturajn, politikajn reĝimon, kiuj baras la evoluon kaj samtempe la progreson. La nura ribelemo kontraŭ la maljusteco montriĝas neefika kaj ne estas signo de libereco. La pasioj ne kondukas al raciaj solvoj de la homaj kaj homaraj problemoj. Ili apartenas al pasintaj stadioj en la disvolviĝo de la homa penso. Nek la pasioj nek la emocioj estas bonaj gvidiloj por la homoj individue kaj kolektive, estas instinktaj, ne raciaj. Kulturitaj homoj devas lerni bridi la pasiojn kaj racie gvidi la emociojn.

La malsukceso de la demokratio en subevoluintaj landoj kaj multfoje la

nekontentiga demokratio en tiuj evoluintaj konsistas multfoje en tio, ke la homamaso ankoraŭ estas neinstruita kaj kondutas pli pasie kaj emocie ol racie. Pro tio proliferas la demagogio kaj la rutina penso heredita de pasintaj tempoj kiel la nacionalismo de la grandaj ŝtatoj kaj la naciismo de senŝtataj malgrandaj regionoj.

En la evoluintaj landoj la supreniro de la kvanta vivnivelo ne aŭtomate altigas la kvalitan vivnivelon. La amasoj ĝuas la altiĝon de la kvanta vivnivelo, sed ne zorgas pri la altiĝo de la kvalita vivnivelo. Ni povas tion rimarki en la banaleco de la plej vidataj televidprogramoj kaj en la ĝenerala interesiĝo pri la sportaj spektakloj, dum tio kulture grava pri sociaj kaj socialaj problemoj estas ignorata. Tio plej grava fariĝas la distrado, kune kun la ne interesiĝo pri la individua kaj kolektiva perfektiĝoj. Nia socio riskas fariĝi banala civilizacio. Ankoraŭ estas nur malplimulto tiuj, kiuj interesiĝas kaj penas por kulture avanci. La socia fenomeno montrita de la filozofo Ortega y Gasset en ***La ribelo de la amasoj*** ankoraŭ daŭras kaj ne ŝajnas, ke baldaŭ finiĝu. Tio grava ne estas la ribelemo de la amasoj, sed la ekzistado de la amasoj mem. En la pasinta deknaŭa jarcento la demokratoj pensis, ke pro la prestiĝo de la intelektuloj, la nekleruloj tiujn sekvus kaj pro tio la demokratio firmiĝus kvankam la nomata popolo nek estus instruita nek klera. Sed tio estis plejparte iluzio. La amasoj ofte apartiĝas de la intelektuloj, ĉar ne komprenas ilin. Sen scienca socio, sen la dubemo fronte al ordinaraj certigoj, kiel proklamis Descartes, ne eblas la konsciiĝo. La homoj estas altirataj laŭ la direkto de la ŝanĝemaj sentaj ventoj, kaj la aperta socio neeblas. Stabila socio, kapabla por propra reformo kaj evoluo ne povas esti starigita. Sen kultura preparo la libereco transiras al diboĉemo, kaj la manko de civitaneco al akceptado de diktaturoj, ĉar sen ordo la socio disiĝas.

La homa socio kiel kultura afero surbazas sur ekvilibro, kiu esence ne estas stabila. Pro tio la socia kunvivado ĉiam devas esti zorgata de la eduko. La malfacila ekvilibro inter libereco kaj ordo, inter la partikularaj interesoj kaj la kolektivaj, inter la propra bonfarto kaj tiu de la aliuloj ĉiam estos socia defio. Eĉ pri la amo, oni mencias, ke oni amu la proksimulojn, pri la malproksimuloj kutime oni diras nenion. Tamen, nuntempe ĉiuj homoj en la mondo estas jam proksimuloj. En tiuj dek mil jaroj de la nuna civilizacio, post la Neolitiko, de multnombraj hom-aroj ni jam atingis esti homaro en la materia civilizacio, kvankam mense ankoraŭ oni restas homaroj. Ni imagu la nunan rapidan transformiĝon daŭriganta pli pluajn dek mil jarojn. Preskaŭ neniu imagas tion, maksimume nur pri la evoluo en la dudekunua jarcento. Certe ni povas diri, ke post dek mil jaroj, se la homaro ne sin mem detruus, en la mondo ekzistus nur unu sola raso, eble unu sola lingvo kaj pruveble unu sola reganta socia organizaĵo. La vojo por tion atingi povas esti facila aŭ malfacila kaj eĉ povas okazi homara detruo. Se la propra detruo de la homaro okazus, tio reprezentos la malsukceson en la naturo de tiu linio de la inteligento en la vivevoluo. La perforto, subpremado kaj la milito estas atestiloj de la kontraŭantaj faktoroj ankoraŭ regantaj kaj neforigitaj de la civilizacio. Konkrete, la proceso de la evoluo de la socio ne devas esti lasata al la hazarda okazaĵo de la eventoj, sed gvidataj de la konscia homa menso. Certe jam estis proklamita la Ĉarto de la Homaj Rajtoj, sed restas sen deklaro la ĉarto de la homaj devoj. La homaj rajtoj fakte ne estas naturaj rajtoj, ĉar se ili estus naturaj, ili jam de ĉiam regus en la socio, ili estas kulturaj rajtoj kaj sen reciproka kultura alteco ili simple estas ignorataj. Ankoraŭ ne ĉie en la mondo ili regas, kaj en terurisma kaj milita situacioj ili restas neaplikitaj. La kultura vasteco en la homa menso permesas pli altan gradon pri la civilizacia disvolviĝo.

Ni jam konstatis la disiĝon inter la intelektuloj kaj la amasoj. Se la intelektuloj delasus sian intelektemon kaj la tuta socio fariĝus amaso okazus granda disfalo de civilizacio. La malsukceso de certaj socialaj teorioj ne havas alian klarigon ol la diktatura subpremo de la penso kaj ties sprimo. Estas progreso en la kulturo la transformiĝo de la amaso en libere pensantajn homojn kio certe bezonas inteligentajn homojn aŭ intelektulojn. Pensantaj homoj sufiĉe kaj humane instruitaj por sin kompreni la sociajn problemojn kaj la proprajn problemojn de la homvivo en tiu konstanta penado sin mem bridi niajn praajn instintktojn kaj gvidi niajn emociojn kaj sentojn per edukado. La studado kaj la edukado fariĝos pli grava en la homa kaj socia vivo ol la nura produktado de bezonaĵoj, kiujn la aŭtomata instruiĝo povos larĝe provizi.

Ni nun traktu la aktualan socian rizon de planediĝo. La procezo mem de la okazaĵoj tendencas al la monda hegemonio de granda potenco kun la sekvo de reakcia opono al tiu hegemonio. La pretendo oponi al ĝi la etnan naciismon ne kondukos precize al konkorda kunvivado. Estiĝos proceso de kunfrontiĝo inter diversaj gradoj de disvolviĝo de nia civilizacio.

Adekvata ne estas la hegemonio de kiu ajn aktuala civilizacio, sed la alkonduko de nova tutmonda civilizacio, kulture aŭ spirita pli alta ol la aktualaj, en kiu, el hom-aroj fariĝu vera homaro. La malgrandiĝo de nia mondo tiel progresas, ke la homaro nepre devos konsisti el unu sola popolo. La nomata popola identeco, kiu tiel disigas la homojn po nacioj devas transformiĝi en individua identeco, kio donas personecon al la homo.

La supera grado de la inteligento en la homo estas la konsciiĝo,ne la aliĝo al kiu ajn kredo aŭ ideologio. Ĉiu el ni devas konsciiĝi pri tiu proceso de planediĝo por ke tiu-ĉi fariĝu konscie gvidata de ĝenerala konscia opinio. Jam la disvolviĝo de la historio ne devas konsisti el blinda antaŭenirado riskante erarajn direktojn en ties disvolviĝo. Oni devas konsciiĝi pri la adekvata direkto de la civilizacio kaj tiun konscie impulsi. Tio ne estas farebla sen ke la plej multo el la homoj komprenu tion konscie kaj tiele agu. Estas impona laboro de kulturo kaj edukado. Sen tiuj ne eblas la supereco la pli alta humana civilizacio, kiu en malgrandigita mondo devas jam esti universala.

Post tiuj konsideroj alvenas grava demando. Kiel efektivigi tiun procezon de kulturo kaj edukado je monda skalo? Ne ŝajnas, ke kiu ajn ŝtata potenco entreprenu ĝin. La agado de kiu ajn potenco kondukos, ne al unuiĝo de la homaro, sed al hegemonio de tiu potenco super la homaro.

La unuiĝo de la homaro, pro la propra karaktero de la afero, devas mildigi la naciajn diferencojn kaj nuligi la landlimojn kaj tion ne faros kiu ajn ŝtato, se ne estu per la premo de konscia ĝenerala opinio, kiu konvinkos eĉ la regantojn mem. Nur transnacia kultura organizaĵo sennaciisma povas sukcese entrepreni ĝin kaj pere de lingvo supernacia kaj neŭtrala pri naciismo.

Necesas transnacia kultura aŭ spirita movado al kiu povas aŭ devas aparteni ĉiuj homoj el la diversaj rasoj, klasoj, religioj kaj nacioj, por tutmonda solidareco kaj paca kunvivado bazita, ne nur sur la toleremo, sed sur la komprenemo, kaj sur la unueco en la diverseco. Ĉiu el ni havas sian visaĝon, ĉiu diferencas de la alia, ni ĉiuj estas similaj, sed ne egalaj kaj eĉ pri la penso, kaj tio ne devas malebligi la konkordan kunvivadon.

Tia movado por unuigi la homaron estis iniciata de Lazaro Ludoviko Zamenhof en la lastaj jaroj de la deknaŭa jarcento. Li kreis la homaranisman ideon kaj la mondlingvon Esperanton. Eble tiutempe, liaj ideoj ne estis komprenataj. Ekde tiam okazis du tutmondaj militoj kaj la nacionalismoj de tiuj potencoj kaj la etnisma naciismo ankoraŭ reviviĝas,

malgraŭ la kreado de Unuiĝintaj Nacioj kaj la formiĝo de la Eŭropa Unuiĝo. Mankas la konsciiĝo pri la necesa unuiĝo de la homaro, mankas sufiĉaj kaj gravaj intelektuloj, kiuj komprenos la aferon kaj povu veki la amasojn, kiuj restas merĝitaj en banalaĵojn.

Ankaŭ la esperantista movado daŭras stagnata kaj vivas aparte de la homaj kaj homaraj problemoj. Ĝi forgesis la penson de la fondinto de Esperanto pri la homarunuiĝo kaj kiel nura internacia lingvo Esperanto ne povas konkuri kun la ĝeneraliĝo de la angla-usona lingvo. Eble la ideologio de Zamenhof de antaŭ ol cent jaroj estis romantikisma kaj direktata al la sentoj, kaj laŭsente oni ordinare reakcias laŭ etnismaj naciismoj kun propraj lingvoj, rigardante la pasintecon.

Ni ne devas reveni al la pasinteco, sed prepari prosperan estontecon. La sentoj devas esti gvidataj de konscia racio. Per nuraj sopiroj kaj revoj oni nenion atingos. Estas necese mensa konsciiĝo pri la homvivo kun ties rajtoj kaj devoj. La unuiĝo de la homaro en konkorda kunvivado kaj en libereco ne estas jam nura idealismo de kelkaj revuloj, sed nepra neceso de transira civilizacio, estas devo de ĉiu homo individue kaj de ĉiuj kune. La esperantisma movado estas la kerno de la ŝanĝo de civilizacio. Unuafoje en la historio la menso de la homo tiun ĉi gvidos en la plej grandan mensan transformiĝon, la inteligento, kiu jam fariĝis konsciiĝo.

***Majo de 1999***

***Giordano Moya.***

Almozuloj... Venas el paĝo 13-a

La solvo por garantii la propriecon de la tero, de la naturo, por ĉiuj, estas argumento, kiu povas esti studata en alia artikoleto. Oni ankaŭ povas trovi tiun solvon en la verkoj de Blas Infante ***El ideal andaluz, antología de textos*** (la idealo andaluza, antologio de tekstoj), ktp. Estas vera bedaŭro, ke oni multe rememoras kaj omaĝas la elstaran patrioton Blas Infante, sed neniu studas la ekonomian penson de tiu grava andaluzo.

***Martí Guerrero i Cotts***

El kovrilo

esperantistaro konas multe pri la granda nombro de muroj, kiujn malinteligento malfalis kaj malfalas.

La dua lecciono el la muro de Berlino estas tre grava, ĉar ĝi pruvas, ke la komunisma ŝtato ne funkciis bone, la komunisma ŝtato fiaskis. La popoloj volas liberecon sed ankaŭ la sekurecon en la laboro, la bonan edukadon kaj bonajn sanulejojn.

Ili volas liberecon, havas liberecon sed ankaŭ maldungon, kaj maldungitoj rememoras la tempon, kiam ili ĝuis sekurecon en laboro.

Tria leciono: la merkato ne solvas plene la problemon de la sekureco en la laboro, la merkato kreas malriĉulojn, ĝi kreas senhomojn.

Kvara leciono: mi, kiel persono, estas en la dubo, la merkato ne funkcias, la komunismo ne funkiciis, sed estas bone por la popoloj havi sekurecon en la laboro kaj sekurecon pri la homaj rajtoj kaj bedaŭrinde la komunistoj perdis la grandan ŝancon historian por havi socian ordon en paco, libereco kaj laboro.

La unua fiasko de la komunismo estis la faŝismo, la dua fiasko de la komunismo estas la merkato, kaj ni la personoj bezonas tiel la liberecon kaj la homajn rajtojn kiel sekurecon en la laboro kaj ankaŭ universalan lingvon.

***Johano Antono Cabezos Martínez***



# *Malfeliĉaj Malkristnaskoj*

Ĉiujare ĝenas min amasaj anoncoj, avertoj kaj reklamoj pri kiom feliĉaj ni devige devas esti pro tio, ke oni konsideras, ke antaŭ du mil jaroj, pli-malpli, la filo de Dio naskiĝis. Post tiu *benata* tempo ni denove iros al la *Batalo por la vivo,*piedpremante ĉiun ajn, kiel bezonate, sed kun pli pura koro pro tio,



ke ni perdonace ĵus pruvis, ke ni ĝojas pro tio, ke Dio naskiĝis.

Nun matematikistoj kaj historiistoj pruvis, ke tio estas mensogo (fakte Kristo naskiĝis kvar jaroj *antaŭ Kristo*!) Sed tio estas nur banala afero, se ni konsideras, ke Kristnasko, same kiel iu ajn alia tempo de nia malbenata tempo, tute ne povas esti feliĉa tempo por ni aŭ por iu ajn alia **homo**. Bestoj atakas kaj mortigas por subteni sin malgraŭ konkurantoj, aŭ por atingi estrecon en sia bestaro, tial ke ĉiu ano agas laŭ ties reguloj. Homo ne povas esti nur besto, kompreneble. Tamen, ĝi estas.

La supraj virinoj estas ĉeĉenoj, kiu penas forlasi sian denaskan hejmon por savi siajn vivojn. La suba viro esprimas similan senton, kiam li forlasas sian denaskan hejmon en kosova Serbio. Kian kristnaskon ili havos?

Se mizerulo bombadas grandan magazenon en Usono aŭ Britujo, pro tio, ke li ne konsentas pri ties politiko, li estas teruristo mortiginda. Se prezidanto de granda potenco ordonas, ke aviadiloj mortigu mizerulon en alia parto de la mondo, pro tio, ke li ne konsentas pri la politiko de ties lando, li restas honorinda kaj respektinda. Tion jam Harry S. Truman pruvis en 1945. Tion ankoraŭ Ŭiljam Klinton pruvas en Kosovo kaj Boris Jelcin en Ĉeĉenjo. Kaj ni ĉiuj, per nia silento, estas komplicoj.

Tiaj restas niaj kristnaskaj festoj je la fino de la 20-a jarcento. La dio de milito ploras sur eŭropa grundo. Bombe.

**Scrooge**



# *Reage al kritika artikolo*

En paĝoj 23-a kaj 24-a de ***Boletín*** n-ro 41-a, de majo-junio 1999 aperas kritika artikolo titolita: *HEF?, pli bone, dankon!*, verkita de S-ro Jorge Camacho (pron. ĥorĥe kamaĉo), pri kies enhavo ni, la subskribintoj, precizigas la jenon:

1 Ni solidare apogas la pluan ekzistadon de la tradicia nomo ***Boletín***, kiun defendas, en sia artikolo, S-ano Antonio Marco kaj aliaj veteranoj hispanaj (vidu paĝon 24-a de la menciita HEF-organo).

2 La internacia radiko *esperantista* ja troviĝas ĝuste difinita en la hispana vortaro. Same *Movimiento= movado*. Do, nenia risko de konfuzo ekzistas. Cetere, ĉu en Esperanto oni devas modifi radikon, ĉar ĝia senco estas diferenca en iu nacia lingvo? tiurilate ne prosperis la propono, de pedanteca esperantisto portugala, ŝanĝi la radikon *puto*, ĉar en lia lando (kaj en tiu nia!) ĝi sonas iom malagrable...

3 Ni neniel povas agnoski, ke la tiel nomita *raŭmismo*, sub kies nomo agadas por Esperanto la serioza *Kooperativo de Literatura Foiro*, kune kun pluraj gesamideanoj tutmondaj, estas, laŭ subjektiva juĝo de Jorge Camacho, la ekvivalento de la politika koncepto *faŝismo*. Tiu ĉi fikomparo estas, niaopinie, ekstreme ofenda kaj malsamideaneca.

4 Ni ne akceptas —kaj ne la solaj!— la akran kritikon de S-ro Camacho kontraŭ la jam tradicia *Premio Klara Silbernik,* fondita kaj ekskludе patronata de la Hispana Esperanto-Muzeo, kies direkcio ĝin fondis kaj plu funkciigas ĝin memore al la senlima apogo, kiun donadis al D-ro Zamenhof lia amosenta edzino Klara Silbernik.

Por fini ni diru, ke tiun premio-sistemon simpatie akceptis kaj aktive ĝin subtenis, inter aliaj, gravaj protagonistoj de nia Esperanto-Movado, kiaj la forpasintaj D-ro Rafael Herrero, profesoro Juan Régulo Pérez, instruisto Francisco Zaragoza Ruiz, la neforgesebla Ramón Molera, koresponda kurs-gvidanto de HEF kaj, lastatempe, iu eksterordinare aktiva esperantisto el Madrido, nome la bedaŭrata Juan Carlos Ruiz Sierra, kiu eĉ grave malsana, iluzie veturis sola al HEF-kongreso en Salou, precipe por tie ricevi la *Premion Klara Silbernik*, tiuokaze aljuĝita al lia amata edzino.

Nome de la Kultura Asocio Esperantista (= KAE), subskribas José María Galofré (prezidanto) kaj ĝiaj membroj Luis Serrano Pérez, Santiago Torné Grau, Ramón Manau Torres kaj Vicente Hernández Llusera.



# Enkonduko en muziko

## *La korda familio*

Kiu ne aŭdis sinfonion de Beetoveno, aŭ kvarteton de Mozart? Kvarteto aŭ *kvararo* estas fakte la kerno de sinfonia orĥestro, kiu estas la instrumento por sinfonioj, laŭ tradicia uzo.

La korda familio konsistas el nur unu instrumento, sed en kvar grandoj: la violono, aldviolono, violonĉelo kaj kontrabaso. Ofte oni mallongigas la vorton *violonĉelon* en *ĉelon*. Violono estas la plej akutvoĉa, tio estas, ĝi sonas plej *alte* en la familio. La aldoviolono estas pli basa, kaj ĝian muzikon oni skribas per klavo de do (𝄡). La *voĉo*, tio estas, la sono, de la ĉelo estas ankoraŭ multe pli basa ol tiu de la aldoviolono pro tio, ke ĝi estas fizike multe pli granda ol aldoviolono. Ĝian muzikon oni legendas per *klavo de fa* (𝄢). Finfine, la kontrabaso (origine *kontraŭ*baso) sonas tiel base, ke ĝian muzikon, skribitan per klavo de fa, la plej basa, oni devas legi ankoraŭ unu oktavo pli base ol oni skribis ĝin. Tio okazas al kelkaj aliaj instrumentoj, kiel gitaro, kaj tiujn instrumentojn oni nomas *transmetaj* pro tio, ke oni devas transmeti la muzikon je la alia parto de la pentagramo.




Violono havas kvar kordojn metalajn agordigitajn po kvinoj, tio estas, ke ĉiu kordo sonas kvin notojn pli alte ol la antaŭa. Violono havas *skatolon* aŭ korpo, *mango* kaj *kapo*. Ĉe la skatolo estas du longaj truoj kun formo de fo, tra kiuj la sono iras en ĝi kaj la resono eliras. La supra parto de la mango ne estas tute rekta, sed ĝia sekcio estas ete kurba. Oni promenas sian fingrojn tie premante la kordojn por fari notojn, kaj pro tio oni nomas ĝin *fingrejo*. Male al aliaj kordaj instrumentoj, kiel gitaro aŭ liuto, ne ekzistas metalaj pecetoj por gvidi la fingrojn al ekzakta loko. Neniu instrumento en tiu ĉi familio havas tiujn *trastojn*. Pro tio estas tiom malfacile ludi violonon, kaj tiom facile rekoni malbonan violoniston. Ĉe la kapo estas la *kejloj*, kiuj estas etaj pecoj da ligno kiuj tenas la kordojn, kiujn entenas je ĝia alia fino la *agordilo*, kio estas aparta tenilo por ĉiu kordo post tio, ke ili apogas sur la *ponto*.

La violonon oni ludas premante la koncernan kordon per la fingroj de la maldekstra mano, kaj samtempe oni frotas ĝin per la *arĉo* aŭ arko, kiu konsistas el marko da ligno kiu tenas ĉevalharojn tirante. Por ke estu frotado, oni metas rezinon sur la ĉevalharojn. Tiel, kiam oni frotas la kordojn per la arko, ili sonas. Oni povas ankaŭ bati la kordojn per siaj fingroj, kaj tion oni nomas *pizzicatto* (pinĉata, en la itala), sed la kutima maniero ludi la violonon estas per arko, ĉar tio multobligas ĝian laŭtecon.

La *kordojn* de la violono oni agordas al sol re la mi, respektive de la kvara ĝis la unua. La plej akuta kordo de la aldviolono, la unua, sonas tiel alte kiel la dua kordo de la violono. La dua kordo de la aldviolono sonas je la venonta pli basa re, la tria sonas je la sol, kaj la kvara kordo sonas je la do. Pro tio, oni uzas alian klavon, kiel dirite. La violonĉelo estas eĉ pli basa, kaj la notoj de la kordoj *malfermataj* (tio estas, senpremate per la fingroj) estas do - sol - re kaj la, skribate ekde la unua je la dua malsupra ekstera linio sur la klavo de fo. La kontrabasan muzikon oni ankaŭ skribas per klavo de fo, sed oni devas legi ĝin unu oktavon pli base ol ĝi estas skribita. La notoj de la kordoj *malfermataj* estas: mi (je la unua subekstera linio) - la - re kaj sol.

Se vi legas tion ĉi en Interreto, deprenu ĉi tie por aŭskulti *la kordan familion* ludante tre antikva *kontraŭdancon* anoniman.

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO**

**Retskribu al
jesuo@esperanto.nu**

**http://esperanto.dragonfire.net/kajeroj.htm**

**Elektronika krizo.-** *Sekve al tio, kio la prezidanto diras en sia raporto, ni sendis mesaĝon invitante al ĉiu samideano kun elektronika adreso en Danio, Finnio, Svedio, Britio, Germanio, Kanado kaj Usono viziti nian tutmonda-teksaĵajn paĝojn. Kelkaj samideanoj respondis pozitive, sed, bedaŭrinde, ne ĉiujn feliĉigis nia iniciato.*

*Ivan Popov diris al ni, ke neblinda mesaĝado povas ĝeni, kaj pro tio, ke li pravas, ni sendis senkulpigan mesaĝon al tiuj samideanoj de Nordeŭropo. Sed Yves Bellefeuille rekte akuzis nin spami, kvankam ĝentile li kunsendis respondaron pri la temo. Post kiam ni analizis la dokumenton kaj aliajn de li referitaj ene de la reto, ni konkludis, ke tio, kion ni faris tute ne estis spami, ĉar mankis al ni la intenco kaj la profitemo. Li respondis al ni, ke "Al viaj komentoj sufiĉas respondi ke la WWW-paĝo ĉe* ***http://members.xoom.com/Jesuo/kajeroj.htm*** *jam ne plu ekzistas pro via spamado. "*

*Ĉu estis Yves Bellefeuille mem, ĉu alia samideano tiu, kiu denuncis nin al sistemestro de Xoom, la resulto estas la sama:* ***esperantisto agis kontraŭ Esperanto****! Sekvas el tio, ke la paĝo Esperanto España, kune kun la elektronika versio de* ***Kajeroj el la Sudo****, ne plu kuŝas ĉe* ***http://members.xoom.com/Jesuo****. Ni devis denove sendi ĝin al nova sidejo, perdante monon kaj tempon. Ni eĉ konsideris elligi ĝin el Interreto, pro tio, ke neniu verŝajne dankas al ni pro nia klopodo disvastigi nian lingvon per Interreto. Kontraŭe al nia antaŭa decido, ni konservos la sidejon* ***http://esperanto.dragonfire.net****, kvankam ĝi kostas monon, sed pro tio, ke ekzistas kontrakto inter ili kaj ni, oni ne povos elpuŝi nin kaprice, sen antaŭa averto kaj la eblecon defendi nin kontraŭ falsa denunco. Tamen, ni pripensas la aferon, pro tio, ke nia sola rimedo estas la kotizoj al la revuo, kiuj estas la plej malmultekostaj ene de esperanta revuaro.*

*La venontan kajeron ni pretigos dosieron pri spamo, Esperanto, kaj kiaj esperantistoj enretiĝis.*

**Depósito legal: Z-2398-88**
**Presejo: Alegría.**